

MONDA ARKIVEJO DE LA ESPERANTO-HEREDAĴO

En la sepdekaj jaroj mi legis artikolon de Victor Sadler pri la graveco de privataj Esperanto-bibliotekoj. Tiam mi decidis ekkonservi Esperanto-librojn, poste konservado iĝis aĉetado kaj kolektado. Unua celo de 100 eroj iĝis celo de ducent, poste kvincent, mil, kvinmil, dek mil. Ankaŭ tion mi transpasis: jam estas pli ol 10 000 libroj, pli ol 4000 revuojaroj. Ĉio zorge ordigita kaj kun detala ĝisdata katalogo.

En 2019 komenciĝas la likvidado de la kolekto de César Vanbiervliet en Kortrijk. Ĉu granda parto de ĝi perdiĝu? Ne, tion certe ne imagis nek deziris César. Do, mi prefere transprenu ĝin por plua konservado. Tiel la kolekto pliiĝas ĝis pli ol 7000 revuojaroj kaj 13 000 libroj. Plus evidente aliaj eroj, duoblaĵoj, miloj da nekompletaj revuojaroj. Inter ili troviĝas unikaj ekzempleroj, miloj da eroj el la unuaj 30 jaroj de la Esperanto-historio, gravaj same kiel etaj verkoj.

Nu, iam ankaŭ mi mortos. Kaj tiam la tuta kolekto perdiĝos, por ĉiam. Tiam la ulo en la jaro 2100, kiu konstatas ke diĝita kopio de serĉata libro aŭ neniam kreiĝis, aŭ estas nekompleta, nelegebla aŭ perdita kaj kiu serĉas originalon, ne trovos ĝin. Ĉar tiun ĉi kolekton oni post mi jam delonge forĵetis. Tiu parto de la homa heredaĵo estos perdita por ĉiam.

Ĉu?

Ne nepre. Hodiaŭ ĝi ekzistas. Estas nia tasko aranĝi la aferojn tiel ke ankaŭ en kaj post 2100 ĝi ankoraŭ ekzistos. Tio eblas, jes. Kun iom da fortostreĉo, konsentite, sed: eblas.

Du eblecoj: aŭ kunigi la kolekton kun alia kolekto ekzistanta, kun la espero ke tiu konservos ĉion ĝis eterno. Aŭ mem iniciati la konservadon. La unua ebleco post elprovado bedaŭrinde evidentiĝis nerealisma, restas do la dua. Ni mem organizu la konservadon, ĉi tie en Belgio.

Kvar kondiĉoj: (1) daŭra jura strukturo sendependa de persono, (2) loko por ĉion stoki, (3) homoj kiuj administras, konservas kaj evoluigas la tuton kaj fine (4) la mono necesa por ebligi la unuajn tri kondiĉojn.

Kondiĉo 1: taŭga jura strukturo estas Fonduso ("Stichting"). Tio estas speco de aspc sed sen gemembroj. Ĝi jes havas almenaŭ tri administrantojn, tiuj decidis pri ĝia estonto. Mi jam ellaboris statutproponon. Helpopeto: kiu emas kunadministrati?

Se vi, ankaŭ se eble vi eĉ nur dubas, bv. kontakti min kaj mi klarigos la detalojn. Esenca estas ke ankaŭ por vi gravegas la konservado de la surpapera heredaĵo de Esperanto.

Kondiĉo 2: eblas konstrui domon speciale konceptitan por la celo de arkivado. Ĝi havos 150 m² da varmigita, aerumita, sekurigita spaco. La Fonduso tie luos senpage, nur la kostojn de varmigado kaj simile ĝi pagos. La konstruado baldaŭ komenciĝos.

Kondiĉo 3: volontuloj certe gravas por ke la kolekto kresku, restu ordigita, skaniĝu. Helpopeto: ĉu vi emas ludi rolon en tio? Bv. kontakti min, eĉ eta helpo utilas, mi volonte klarigos ankaŭ pri tio. Kompreneble dum mi vivas ankaŭ mi mem plu volontulos tie.

Kondiĉo 4: evidente necesas mono. Fonduso jure devas havi vivobazon, ĉiujare necesos kelkmil eŭroj. Ankaŭ pri tio ekzistas jam vojoj. Aldone krom subvencioj ankaŭ donacoj gravos.

Do jen staras nun la plano pri Monda Arkivejo de la Esperanto-Heredaĵo. Ĉu vi vidas rolon por vi en ĝi, aŭ eĉ nur dubas pri rolo, tiam bv. kontakti min! Via helpo ege gravas por ke la plano realiĝu. Ĉu vi kune certigos ke en 2100 (ne nur) sciencistoj trovos kion ili serĉas? Inda vivocele!

Marc Vanden Bempt (marc@esperanto.be)

